



Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 10, Oktobro, 2007

NASK en San-Diego

Tina Seastrom

Mi ege ĝuis la tempon, pasigitan ĉe NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) en San-Diego, kiu fariĝis unu el la plej miaj ŝatataj spertoj! La partoprenintoj venis el Japanio, Germanio, Kanado, Irano, Makedonio, Britio kaj, kompreneble, Usono. La superan klason de 13 studintoj gvidis d-ro Paŭlo Gubbins (vd la foton: instruisto kaj mi) – la brita kreinto de Pasporto al la Mondo. Fakte, mi studis en la 9-opa mez-grupo de Lee Miller. Grave, ke ni uzis E-on preskaŭ ĉiu-hore kaj ĉiu-tempe: dum lecionoj, en restoracio, en ludejo ktp. Oni devas substreki la alt-nivelon de nia manĝaĵo, ĝi estis bongusta, abunda, do, perfekta. Dum la matenmanĝo ni ricevis numeron de nia bulteno La Naska Fasko – ĉiutaga eldono kun informo, artikoloj, poezio ktp. Mia persona instruisto, Lee Miller, kiu en la klasejo parolis nur E-e (bona imito por ĉiu usona klubo kaj societo), ofte instigis nin kanti E-e, li disdonis E-gramatik-foliojn. Ni havis ankaŭ du ekzamenojn pri verkado de Bill Auld. Ekskursoj ne mankis: tra la urbo (butikaro, diverspecaj temploj), en fiŝejo, bestejo. Fine, ni atendis feston de E-aŭtoro D. Jordan. G. Goodall, direktoro de NASK, estro



de lingvistika fakulo de UCSD, gvidis du ekskursojn, inter kiuj – pri la arkitekturaj stiloj de Kalifornio.

Mi devas rekomendi al ĉiuj frekventi la E-kurson kaj havi sperton en ĉiutaga E-vivo.

Tina Seastrom

Atenton! Gravas por nia estonto! Proponu! Subtenu!

Ĉi jare okazos vica elektado de la societa estraro. Laŭ nia Statuto (Artikolo VI.1) kandidatoj por la postenoj de prezidanto, vic-prezidanto, sekretario kaj kasisto devus esti nomumitaj septembre (!). Bonvolu urĝe sendi rete aŭ per poŝto al la adreso de la redakcio viajn kandidat-proponojn.

Anticipan dankon.

Viktor Pajuk,
prezidanto

Nova E-eldono

Fine de pasinta 2006 jaro la kultura panoramo de Esperantujo prezentis klarajn signojn de stagnado: anoncis pri sia “portempa” malapero la literature revuo “Fonto” (Brazilio). Multaj esprimis la bezonon je nova internacia periodaĵo kaj burĝonis la ideo publikigi Belettran Almanakon, sen regula, deviga aperitmo. Kaj ĝi finfine aperis, ege interesa literatura revuo sur 180 paĝojn, kiun mi rekomendas aboni (aĉeti) al ĉiu senescepte E-isto (almenaŭ de niu E-societo). Bunta, enhav-riĉa, ĝi sendube, plaĉos al vi, kaj vi, legante ĝin, plialtigos vian lingvo-nivelon.

Do, ek! Ne malgrave, ke ĝi aperas en Usono, Nova Jorko.

Veraj E-istoj, turnu vi

al: beletraalmanako@hotmail.com

Araneo

Lingva anguleto

D-o: Kiu estas la leksika fono de Esperanto? Ĉu ĝin konsistigas la latina kaj latinidaj lingvoj aŭ ankaŭ ĝermanaj, slavaj kaj la helena lingvoj?

R-o: La plej uzataj vortoradikoj eniris en E-on ne tiom el apartaj lingvoj, kiom el la Eŭropa internacia vortostoko, kiu manifestiĝas por Esperanto kiel vortoradikoj. Tio signifas, ke la plej uzataj vortoradikoj eniris en Esperanton, se ili estis rekoneblaj por portantoj de kiel eble plej multaj el kvar lingvoj. Ĉar la franca lingvo kaj, en malpliigaj gradoj, la angla, kaj germana lingvoj enhavas amason da vortoj (oftaj kaj maloftaj) latin(id)devenaj, la vortostoko de Esperanto aspektas en sia plej uzata parto (laŭ malkreskanta grado) kiel latina kaj latinida, ĝermana kaj slava. Apartaj vortoradikoj (ĉefe por signi lokajn realaĵojn) eniras en Esperanton el multaj aliaj Eŭropaj kaj ne-Eŭropaj lingvoj. La Esperanta vortoradiko plej ofte estas mezigita formo de vortoj-modeloj, proksimaj laŭ formo kaj semantiko, el la lingvofontoj de Esperanto.

Demandoj??

1. En 2008 la Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos en Montreal (vidu la emblemon sube), kune kun la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. Sed kie ni kongresos en 2009 kaj 2010? – demandas nin Esperanto-USA (ELNA)



2. Kiu scias ion pri la nuna vivo de s-ro Seymour Rabens, kiu agis en nia klubo en 1997, bv informi Boris Kolker rete:
b_kolker@yahoo.com

Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

23an de Oktobro – pri sia patro – astronomo kaj E-isto, prelegos d-ro Kordylewski
27an de Novembro – elekta kunsido, plan-starigado por estonto,
E. Mihalski (1897-1937) - renoma E-poeto
16an de Decembro – Zamenhofa benkedo (la loko estos anoncita baldaŭ)

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj

